



# Pos-Amiko

IJK 2022, alventago, numero 42

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## Finfine okazas ĉeesta Internacia Junulara Kongreso

“Mi vojaĝis tiom da horoj, tio ĉi pli bone montriĝu inda por eliri mian komfortan seĝon.”

– averaĝa esperantisto post du jaroj da retaj kongresoj.

## La mistera kazo de la mankanta ĉeforganizanto

Organizado de IJK estas teama laboro. Granda teamo de entuziasmuloj laboras kune por krei neforgeseblan semajnon, sed kutime kelkaj laboras pli kune ol aliaj. Ankaŭ ĉi-jare tiel okazis, kaj la sukceso de la IJK multe ŝuldas al tri homoj: Roĉjo la ĉeforganizanto, Agata la programmajstro, kaj Mia la granda plananto. Kion ni farus sen ili?

Pli bone ni eksciu baldaŭ, ĉar du semajnojn antaŭ la IJK kaj Roĉjo kaj Agata subite malaperis. Laŭ fontoj en la teamo ili ne plu eltenis la senĉesajn demandojn (ĉiam la samaj!), senhaltajn ĉambroŝanĝojn kaj nekalkuleblajn tipojn de subvencioj, kaj decidis forĵeti ĉion kaj fuĝi al Bjeŝĉadoj. La resto de la teamo perdis tutan tagon nur serĉante, kie troviĝas tiu loko, kaj daŭre ne scias.

Provizore do ŝajnas, ke la 78-a IJK havos nek organizadon nek programon. Ja antaŭe estis Internaciaj Junularaj Kongresoj sen organizado (ekzemple IJK 2011) aŭ sen ajna programo (inter alie IJK 2010), sed manko de ambaŭ estus novaĵo.

Momente oni eĉ timis, ke ankaŭ mankas Mia, sed ri evidentiĝis simple kaŝiĝi en la kuirejo dum la tuta tago. Do almenaŭ estos manĝo.

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Por esti akceptita pli frue en akceptejo, iĝu organizanto.

**Taŭro:** Atendu alparoli hazardajn fremdulojn ĝis eniro de la kongresejo.

**Ĝemeloj:** Ĉu vi alvenis tro malfrue por la vespermanĝo? Aĉetu fritajojn en la trinkejo!

**Kankro:** Aŭgusto estas bona monato por sperti plej bonan kongreson de via vivo.

**Leono:** Memoru, la celo de interkona vespero ne estas venki kontraŭ la aliaj.

**Virgulino:** Post plenplena IJK-buso vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi forĝesis aliĝi al karavano kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Se viaj gepatroj demandas: vi estas en serioza kongreso kaj ĉiuj iras dormi frue.

**Niko:** Atentu ne sendi buson sur la fervojon akcidente.

**Sagitario:** Kiu ne volas vekiĝi frue, tiu starigas sian tendon apud arboj oriente.

**Kaprikorno:** Vi malkovras, ke pli bongustas ĉerizo ol ĉemizo.

**Akvisto:** La plej mallonga vico en la akceptejo estas por la malaliĝintoj.

**Fiŝoj:** Ĉiam portu vian nomŝildon por eviti la unuajn du demandojn de ĉiu konversacio.

## Programo

	<u>Manjejo</u>	<u>Ekstere</u>	<u>Scenejo</u>	<u>Filmejo</u>	<u>For</u>
08:00					
09:00					
10:00					
11:00					
12:00					
13:00					
14:00					14:40 IJK-buso
15:00					
16:00					16:10 IJK-buso
17:00					
18:00	Vespermanĝo				18:00 IJK-buso
19:00					
20:00			Interkona vespero		
21:00					21:00 IJK-buso
22:00	Trinkejo				